Theodor Storm,

Surerikeje

tradukita de Manfredo Ratislavo

Surerikeje, dum paŝas mi;
eĥe, subtere kunmigras ĝi.
Venis aŭtun', printemp' estas for -
pri la feliĉ' nur restis memor'!
ĉirkaŭfantomas nebuloj kaj tre
tristas herbar' kaj ĉielo. – Ho, se
mi ne irintus en maj' tie ĉi!
Vivo kaj amo – forflugis ĝi!

Traduko de la Germana poemo "Über die Heide" de THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1085.*

Arg-179-362 (2004-02-23 22:28:32)